Plezurigaj tagoj en Mielno,
unu el la perloj de la Balta Maro

Logite de la multaj laŭdoj pri ĝi, mi unuafoje partoprenis en la 29-a Ĉebalta Esperantista Printempo (ĈEP), kiu okazis en la ĉarma pola urbeto Mielno (germana nomo: Groß-Möllen) de la 12-a ĝis la 20-a de Junio .
Mielno situas 12 kilometrojn norde de la urbo Koszalin (Köslin) ĉe la Balta Maro. La 75 partoprenantojn atendis tie komforta loĝado en relative moderne ekipita sport-lernejo kaj riĉa, densa programo, kiu tamen lasis sufiĉe da tempo por promenadi laŭlonge de la nur iom pli ol cent metrojn fora sentajda maro kun sia longega, sabloriĉa plaĝo aŭ por vagadi tra la urbo.
Multaj fideluloj vizitis la aranĝon jam pli ol dek-, eĉ dudekfoje.
La programo inkluzivis i.a. plurajn prelegojn pri sanecaj temoj, analizon de la lingva situacio en la Eŭropa Unio, rerigardon al la pli ol 35-jara kunlaboro kun la neu-brandenburgiaj esperantistoj fare de Werner Pfennig, prezenton de fabeloj kaj legendoj en la klasika muziko, voĉlegadon el ĵus aperinta nova rakontaro de Lena Karpunina kaj ĉiutagan komunan kantadon kun akordiona akompano de Urszula Giercarz.
Mi mem gvidis lingvoperfektigan kurson, en kiu partoprenis inter 20 ĝis 30 personoj, strebantaj plibonigi siajn konojn pri la Esperanto-gramatiko.
Paralele havis lokon konversacia rondo, kiun gvidis la sperta brita esperantisto Terry Page.

Aparte ĝojigis min la revido kun miaj malnovaj amikoj Ian McDowall kaj Eric Walker, ambaŭ el Britio, kiuj dum siaj vivoj nekredeble multe vojaĝis tra la tuta mondo pere de Esperanto kaj povis rakonti pri interesaj travivaĵoj.
Busaj ekskursoj konatigis nin kun la nemalproksimaj belaj urboj Kołobrzeg (Kolberg) kaj Koszalin, kiuj impresis parte per siaj malnovaj domoj, parte per moderna, okulplaĉa arkitekturo. Sperte ĉiĉeronis por ni Czesław Baranowski, la ĉeforganizanto de la aranĝo. Ni krome ĝuis unuhoran ŝipveturadon sur la mielna lago Jamno, kiu havas proksimume la trioblan grandecon de Müggelsee.
Apartan laŭdon meritas ankaŭ la elstare bongustaj manĝoj, per kiuj oni regalis nin ĉiutage.
Preskaŭ duono de la parto-prenantaro – nemirige – estis poloj, laŭkvante sekvis germanoj, belgoj kaj britoj. Entute estis reprezentitaj 8 landoj.
La bon-etosan aranĝon finis gaja vespera festado apud bivakfajro kun multe da kantado kaj dancado.

Por informiĝi pri la sekvonta (30-a) ĈEP en Mielno, bonvolu rigardi sub www.esperanto.koszalin.pl.

Gerd Bussing